# *Loko, lokoj*

La kosmo estas … loko. La Tero estas… loko. Kontinento estas loko. Lando estas loko. **Eŭ**razio estas loko. Eŭropo estas loko. Ruslando estas loko. Ruslando, Rusujo, Rusio – estas la sama loko. Monto – estas loko. Valo estas loko. Arbaro: estas loko. Urbo estas loko. Vilaĝo estas loko. Strato estas loko. Placo estas loko. Parko estas loko. Ĝardeno estas loko. Domo estas loko.
Ĉambro estas loko. Ŝranko estas loko. Tirkesto estas loko. Skatolo estas… loko! Semajno… ne estas loko. La kosmo estas tre granda loko, skatolo estas malgranda loko. Mi havas skatolon. Mi havas malgrandan skatolon. (Tiu malgranda skatolo estas alumetujo.) En la malgranda skatolo estas kokcinelo. En la kosmo estas skatolo, en la skatolo estas kokcinelo






| | |
|---|---|
| kia loko ? | |
| bela loko (kia loko?) | |
| belega loko (kia loko?) | |
| granda loko (kia loko?) | |
| malgranda loko (kia loko) | |
| eta loko | |
| proksima loko | |
| malproksima loko | |
| tre malproksima loko | |
| **kiu loko?** | |
| tiu loko | |
| ĉi tiu loko (kiu loko?) | |
| ĝusta loko | |
| neforgesebla loko (kia loko?) | |
| stranga loko | |
| varmega loko | |
| sendube belega loko | |
| a**lia** loko | |
| la sama loko (kiu loko?) | |
| **la plej alta loko** | |
| tre granda loko | |

| | |
|---|---|
| malgranda loko | |
| pitoreska loko (kia loko?) | |
| loko kun vigla trafiko | |
| naskiĝa loko, naskiĝloko | |
| laborloko | |
| loĝloko | |
| ĉiu loko | |
| ne ĉiu loko | |
| **senarba loko (loko sen arboj)** | |
| senakva loko (loko sen akvo) | |
| senmonta loko (loko sen montoj) | |
| montara loko | |
| vere belega loko | |
| loĝata loko | |
| kosmo, tero | |
| kontinento | |
| lando | |
| urbo | |
| **strato** | |
| parko | |
| vilaĝo | |
| arbaro | |
| monto, valo | |
| vizitinda loko | |
| ŝranko | |
| tirkesto | |
| (tiu malgranda) skatolo | |
| kokcinelo | |
| alumetujo | |

Aldona rimarko:

Tiu ĉi kokcinelo ne estas en la alumetujo,
ĉar **ĝi** estas tro granda kaj **tiu** estas tro malgranda.



